

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ huhtikuu ♦ aprilo ♦ 2/2012



**Kalevala: Centro de la finna kulturo,
Esperantonkielinen Kalevala, p. 4–7**

♦ Google Translate aldonis Esperanton, p. 8

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanpaja.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 22 e/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adressanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Sampo 800017-230825).

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 330

Kannen kuva: *Francesca Toldrà* / Mantelinkukkia, lähde: <http://www.sxc.hu/photo/1363872>

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:
Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 09 813 3024, tiina.kosunen945@gmail.com
Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com
Jukka Nikoskelainen, Pohjolankatu 11, 20100 Turku. ☎ 050 525 3745 ✉ juknik@utu.fi
Keith (Keke) Uber, Poutapolku 3 B 30, 02110 Espoo. ☎ 040 413 4252 ✉ keith_uber@yahoo.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:
Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi
Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de
Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Sampo 800017-230825).

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:
FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (Sampo 800020-5995369) (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando



Kaksikielisyys täyttää pyöreitä

On usein sanottu, että Suomessa on maailman vapaamielisin ja edistyksellisin kielilainsäädäntö. Ensimmäinen suomen ja ruotsin täysin tasa-arvoiseksi määrittelevä kielilaki säädettiin vuonna 1922. On siis juhlavuosi, kotimaan kaksikielisyys täyttää pyöreitä.

Valitettavasti alkuvuonna ei ole asialle kunniata tehty, päinvastoin. Kiista armeijan ainoasta ruotsinkielisestä varuskunnasta on muuttunut sellaiseksi farsssiksi, jolle voisi nauraa ellei itketttäisi. Hyvä pyrkimys säästää puolustusmenoja mm. vähentämällä koulutuspaikkoja on antanut tilaisuuden kaksikielisyyden vastustajille nostaa häntäänsä vaatimalla Dragsvikin varuskunnan lakkauttamista.

Vähemmistökielemme on käynyt vuosikymmenien mittaan aina vain vähäisemmäksi, mutta sen asema on haluttu säilyttää. Suomi on pitänyt kiinni ihmisen ja yhteisöjen kunnioituksen periaatteesta. Siihen kuuluu, että ihmisillä on oikeus kasvuun ja kansalaisuuteen äidinkielellään. Se toteutuu kielilain puitteissa; se määrittelee ne edellytykset, joiden vallitessa on järjestettävä vähemmistökielillä lähipalvelut, kuten koulutus ja terveydenhoito. Oikeutta on oikeus saada äidinkielellä koko maassa.

Vuoden 2003 kielilain 39§ määrittelee, että Suomessa on yksi ruotsinkielinen joukko-osasto. Varusmiespalvelukseen määrätään kaikki miehet koko maasta. Asevelvollisuuslain 55§ turvaa oikeuden tulla määrätyn joukko-osastoon, jonka opetuskielenä on varusmiehen äidinkieli. Kielilaki takaa saman oikeuden siviilipalvelusmiehelle.

Kielipolitiikka on pyrkimysten ja näkemysten taistelua. On tunnettua, että – ikävä kyllä

– kaikilla meistä suomalaisista ei ole kansallisten kielten tasa-arvosta samaa, kunnioittavaa näkemystä. Nyt eräät ”suomalaisuuden” poliittiseksi keppihevosekseen ottaneet tahot ovat asettaneet puolustusministeri Stefan Wallinin (rkp) luottamuksen kyseenalaiseksi, koska hän on ”harjoittanut poliittista ohjausta ruotsinkielisen varuskunnan säilyttämiseksi”. Sellainen syytely on ala-arvoista, olkoonkin että ministeri on komuroinut ajaessaan asiaansa.

Meillä on täysi syy olla tyytyväisiä siitä, että kielilaki on perusteiltaan samana kestänyt jo yhdeksänkymmentä vuotta. Sen juuret ovat autonomian ajan suomenkielisissä sivistyspyrkimyksissä ja itsenäisyyden ajan kansallisen sovitun pyrkimyksissä. Me suomalaiset pääsimme luomaan tasa-arvoisen kielipolitiikan perusteita lähes sata vuotta aikaisemmin kuin vaikkapa balttilaiset naapurimme, joitten kansallishistoria on paljon rikinäisempi.

Resumo – Sammandrag

Svenskt sammandrag behövs inte, för tack vare vår sunda finländska språkpolitik har alla fått lära sig att begripa varann.

Temas pri la 90 jaroj de la Finnlanda ”plej liberala kaj progresema en la mondo” leĝo pri du egalrajtaj naciaj lingvoj, finna kaj sveda. La ministro pri defendo estis forte atakita de kontraŭantoj de la dulingvismo, ĉar li decidis konservi la solan svedlingvan garnizonon – fakte laŭ postulo de la leĝoj kaj prilingva kaj priarmeas. – Finnlando havis en konstruado de lingva kaj nacia sento kaj konsento pli bonan ŝancon kun jarcenta aŭtonomeco ol ekzemple la Baltlandaj najbaroj.

Tuomo Grundström

Kalevala: Centro de la finna kulturo

Oni povas diri en sia entuziasmo, ke la tradukinto donacis al Esperantujo tutan mondon.

Fes, Kalevala estas ne nur epopeo, sed tuta mondo, tiel same, kiel tuta mondo estas la Homeraj epopeoj. Sed la mondo de Kalevala estas pli pratempa ol la Homera, eĉ pli pratempa ol la sumeraj-asiraj epopeoj parolantaj pri urbloĝanta popolo. En Kalevala ne ekzistas urboj, ĉio okazas sur la kamparo, sur brulsarkejoj, en arbaroj, en kampodomoj. Tiu praeco, kompreneble estas ne tempa, sed socio-struktura: en Kalevala vivas ankoraŭ la genta socio, antaŭa al la sklavtena kaj feŭdalisma, iel simila al tiu de indianoj en Kanado, eĉ – eble, de la eŭropanoj en la glacia epoko. En Karelio, en la malproksima Nordo – tie estas la ĉefa trovloko de la Kalevalaj runoj – eĉ en la 15-16-a jarcento povis ankoraŭ evolui, flori kaj disbranĉi tiu pratipa poezio, kiun pli sude kaj okcidente jam neniigis la feŭdalismo, ekstermis la kristanismo. Kiam Lonnrot 1828 kaj 1849 kolektis la runojn de la epopeo, tiu socio-strukturo jam ĉesis, tiel ke la kantistoj jam ne memoris pri ĝi, memoris nur pri la kantoj. Eĉ pri tiuj ne perfekte: preskaŭ ĉiu diris al Lonnrot, ke antaŭlonge oni sciis multe pli multajn kaj belajn kantojn.

Multo perdiĝis do, sed kia trezoro estas, kio restis, kia riĉega fonto de la tradicioj por la finna nacia kulturo! Oni povas diri, ke iel simile, kiel Homero influis la kulturajn vivon de la helenoj ("Homero edukis Helladon" – diris Platono), Kalevala fariĝis centro de la finna kulturo kaj spirita vivo: literaturo, filologio, belaj artoj, muziko. Pri ĝia populareco estas karakteriza, ke poste la folkloristoj trovis plurajn popolkantojn, kiujn la popolo ĉerpis jam ne el buŝtradicio, sed el la eldonita Kalevala.

La kadro de la epopeo estas la rekonkero de la mirakla muelilo Sampo, kiu muelas por ĉiuj bonhavan kaj feliĉon. La rekonkero ne sukcesas perfekte: nur rubojn, splitojn de Sampo oni po-

vas savi, sed eĉ tiuj povas esti fonto de la feliĉo eterna.

Multe pli grava, tamen ol tiu epopea kadro, estas la epizodoj de la epopo: la historio de la ventanima kaj labilmensa Lemminkainen, batalema kaj flirtema, nerezistebla virinkongeranto, al kiu kien li la kapon turnis, tie oni donis kison, kaj kies patrino estas kvazaŭ enkorpiĝo de la patrina amo ĉiopova; la historio de Kullervo, kiu vivas obsedite nur por la venĝo pro sia ekstermita gento kaj fariĝas viktimo de nevola incesto kiel reĝo Edipo. Sed la centra figuro estas aĝa saĝa Vainemoinen, la eterna prakantisto, kiu estas ŝamano, sed per sia naskiĝo kaj siaj vortoj kaj faroj kreskas en mitajn dimensiojn, ĉar li scias la plej magiajn kantojn, kaj en tiu mondo la kanto havas miraklan efikon: la plej granda heroo estas, kiu plej bele kantas. Kaj tiu norda bardo ne malpli scias kanti ol la grekmita Orfeo: birdoj, fiŝoj, vermoj venas aŭskulti lian ensorĉan kanton, de kiu:

floroj ekburĝonis bele kaj arbustoj riverencis.

Per kanto li endormigas la tutan popolon de la mastrino de l' Nordo; la fanfaronan junan Joukohainen li kantas ĝiskole en la teron. Li scias ĉiujn metiojn, ekstermas arbaron, kulturas teron, faras boaton, fiŝkaptas, ĉastas, kaj, se necese, kuracas, estas saĝa gvidanto de sia gento. Lian bonan koron montras, ke ĉe arbar-ekstermo li lasas betulon staranta, por ke la kukolo havu kien flugi por sidiĝi. Lia malforta flanko estas lia maljunula avido je junulinoj. Aino elektas prefere la morton ol al li edziniĝi. Ankoraŭ unufoje li svatas sin pri junulino, sed post la rifuzo li rezigne deklaras:

*maljunul' ne svatu junan, nek deziru belulinon,
nek rivale strebu svati konkurante kun pli junaj.*

Krom la kanto, la alia mirindaĵo en tiu mondo

estas la fero, tiom ke eĉ Vainemoinen ne scias sanigi sian ferfaritan vundon, kaj Ilmarinen, la forĝisto, kiu povas manipuli tiun sorĉan metalon, fariĝis mita persono: forĝinto de la firmamento, li povas forĝi ankaŭ flugantan birdon el fero. Tamen ankaŭ lia povo havas limojn: vane li provas forĝi el oro edzinon anstataŭ la edzino mortinta, la statuo restas senviva, ĉar kiel avertas aĝa saĝa Vainemoinen:

Oro spiras nur malvarmon kaj arĝento frapas froste.

Ankaŭ naiva kosmogonio troviĝas en la epopeo kaj mitologiaj estaĵoj: feoj kaj feinoj de akvo, de ondoj, de arbaro, aparas ankaŭ Ukko, la dio de la ĉielo: la mondo de Kalevala estas pagana mondo. Montriĝas ja ankaŭ kristana influo tie ĉi kaj tie, sed ties spuroj, kiujn Lonnot eble alprenis por kapti la bonvolon de la klerikaro, estas fremdaj al la tuto de la epopeo, pravigante la lastan kanton: kiam ekregas la filo de Marjetta (Maria), la olda Vainemoinen foriras

por eterne.

Vigle restas en la memoro la realistaj kaj lirikaj partoj de la epopeo kantantaj la alte respektatan forĝistan laboron, la ŝpinadon kaj tekstadon de knabinoj, la hejman laboradon, la ĉasadon, fiŝkaptadon, saŭno-banon, veladon, skiadon, la ĝojojn de la nuptofesteno kaj de la geedza vivo. Ankaŭ la humuro estas reprezentata per fanfaronado, mensogado, troigaj priŝkriboj.

Ĉio ĉi estas prezentata per la praa poezia formo de la paralelismo kaj riĉaj aliteracioj, kiuj kune efikas vere iel magie, enlulas la aŭskultanton en ian staton de fasciniĝo. Se oni transdonas sin al tiu efiko oni perdas ĉirkaŭ si la modernan medion kaj pli kaj pli sentas sin ĉirkaŭata de mondo de fabelo, per kiu nin ĉirkaŭverŝas fantazio prapopola kun epopea abundo kaj en kiu ni baldaŭ fartas tre bone.

[*Fonto: Esperanto 1965: junio, p. 110-111*]

Kristalklara traduko

La traduko estas riĉa rezulto de admirinda fortostreĉo, plena rego super la lingvo, majstra manipulo de formo. Tuj komence, la enkonduko kaptas la leganton per vere sorĉa sonefiko de aliteracioj kaj pensoritmo:

*Menso mia estas ema, cerbo mia certe celas
kanti nun, komenci ruli tiujn riĉajn rasajn
runojn,*

*kiujn la prapatroj pensis, kreis nia nobla gento.
Vortojn en la buŝo bolas, versoj laŭ la lango
svarmas,*

ritmoj interdente rajdas, melodioj moduliĝas.
Eĉ se tiun sonmuzikon la traduko ne povas teni senintermite tra ĉiu kvindek kantoj de la epopeo, sed ĉiam ree kaj ree li povas doni al la verso la ŝamanan magion de la literimaj. Lia ritmo estas senriproĉa: neniam li pekas kontraŭ la severe trokeeco de la teksto kaj la pureco de la cezuro. Kaj lia lingvaĵo estas kristalklara, ĉie

facilege komprenebla; fakte oni povas konsenti kun la postprezentanto V. Setälä, ke ĝi estas rekomendebla ankaŭ kiel lingva ekzerco de ne tre progresinta esperantisto.

La tradukinto J. V. Leppäkoski ne estas tre konata en Esperantujo, kvankam jam en 1923 li tradukis modele poemojn de Koskenniemi por Literatura mondo. De tiam pasis pli ol kvardek jaroj, kaj la grandan parton de ĉi tiu tempo li dediĉis al tiu laboro, per kiu li donis al ni tradukon almenaŭ egalnivelan al iu ajn traduko nacilingva, kaj li mem leviĝis inter la klasikulojn de la Esperanta tradukarto.



Kálmán Kalocsay

(*En: Esperanto 1965:6, p. 11.*)

Esperantonkielinen Kalevala

Kalevala, suomalaisen kansanrunouden ainutlaatuinen kokoelma, jonka runot Elias Lönnrot keräsi ja muokkasi kokoelmaksi, on käännetty monilla kymmenille kielille, myös esperantoksi. Tämä käänнос on merkityksellinen erikoisesti myös siksi että Kalevala liitettiin esperantonkielisen kirjallisuuden sarjaan Oriento-Okcidento, jonka tarkoituksena on UNESKOn ja Universala Esperanto-Asociation yhteistyönä julkaista maailmankirjallisuuden merkkiteoksia päämääränä lähentää eri kulttuuripiirejä ja jossa kansalliseepoksemme sai paikkansa neljäntenä esperantoksi käännettynä merkkiteoksena ja johon myös Danten Divina Commedia kuuluu.

Kalevalan esperantoksi kääntäjä, runoilija ja sanomalehtimies Johan Edvard Leppäkoski syntyi Laatokan Karjalassa runonlaulajien sukuun kuuluvana. Esperantoon hän tutustui sattumalta nuorena poikana, opiskeli kielen ja viehättyi sen ihmeteltävän yksinkertaiseen ja samalla täysin ilmaisykykyiseen rakenteeseen niin syvästi, että hän jo 1920–1922 julkaisi esperantoksi käännettynä Kiven, Koskenniemen ja Kojon runoja aikakauslehdessä Esperanta Finnlando. Nuoren Voiman Liiton jäseneksi hänet hyväksyttiin näiden käännösten perusteella, ja tämä tunnustus innoitti hänet jatkamaan käännoistyötä ryhtymällä kääntämään Kalevalaa esperantoksi. Työ kesti talvisodan päiviin asti, jolloin vuosikymmenien työn tulos, lähes valmis käsikirjoitus Käkisalmen evakuoinnin yhteydessä joutui kadoksiin. Sotien loputtua runoilija Leppäkoski uudessa kotikaupungissaan Jyväskylässä ryhtyi jälleen käännoistyöhön ansiotyönsä ohella ja sai teoksen lopulliseen painoasuun 1960. Tämä työ, johon runoilija Leppäkoski käytti miltei kaiken vapaa-aikansa, merkitsi hänelle monia innoituksen hetkiä, mutta myös suuria vaikeuksia ja hellittämätöntä uurastusta. Kalevalaa käännettäessä vieraille kielille on ennen muuta vaikeutena saada jokainen lukija tajuaamaan tapahtumat ja kalevalai-



Irja Klemola

nen ajatusmaailma niin hyvin kuin mahdollista alkuperäisen runon hengen kärsimättä. Vaikeutena ovat myös ne käsitteet, jotka eri vuosisatoja edustavassa Kalevalassa ovat kerrostuneita toinen toisensa lomiin, ja luonnollisesti myös suomenkielen sana- ja vivahdusriikkaus, jotka aina aiheuttavat omat pulmansa, olipa kysymys kääntämisestä mihin vieraaseen kieleen hyvänsä. Nämä vaikeudet Leppäkoski ratkaisi taitavasti, mm. käyttäen hyväkseen kalevalaista kertoa.

Runoilija Leppäkosken vuosikymmeniä kestänyt uurastus, johon varsinaisen käännoistyön lisäksi kuului perehtymistä kansanrunouteen ja siitä julkaistuun tieteelliseen kirjallisuuteen, johti kauniiseen tulokseen. Hänen esperantonkielinen Kalevalansa sisältää kansalliseepoksemme luonnonlyriikan, elämänviisauden ja henkilöhahmot aitoina ja vaikuttavina. Lausutuina sen runot voivat syvästi liikuttaa kuulijoita, joilla ei ole ollut minkäänlaista kosketusta Kalevalan kotimaan kansaan ja luontoon, sil-

lä kansanrunon kaunistuskeinot, alkusointu ja kerto, esiintyvät myös käänöksessä aitoina ja nautittavina ja omalla tavallaan välittävät vieraskieliselle kuulijalle tai lukijalle muinaisten runolaulajien ihmeellisen taidon pukea sanoiksi näkynsä ja tunteensa.

Esperantonkielisen Kalevalan julkaiseminen ei merkinnyt sitkeää ja määrätietoista uurastusta ja ponnistelua yksinomaan sen kääntäjälle. Oman ja osaltaan ratkaisevan panoksen julkaisutyössä antoi Esperanto-Säätiö ja maisteri Vilho Setälä. Ennen kaikkea tarvittiin rahasummia, joita tällaisessa tapauksessa ei ilman muuta ollut käytettävissä. Oli hankittava ennakkotilauksia, joita saatiinkin huomattava määrä sekä kotimaasta että ulkomailta, ja etsittävä lahjoittajia, kun ennakkotilausten määrä ei riittänyt julkaisemiseen. Suurimman lahjoituksen teki opetusministeriö, seuraavaksi suurimman karjalainen Suoja-säätiö ja kolmanneksi suurin on Taito Lippahaisen testamenttilahjoitus. Myös Ruotsista Falunin esperantoseuralta saatiin tuntuva lahjoitus. Lahjoituksia, joiden määrä oli 100 silloista markkaa tai enemmän, saatiin puolitoistakymmentä. Myös se työ, joka tarvittiin kirjan ulkoasua varten, antoi kauniin tuloksen, sillä esperantonkielisessä Kalevalassa Akseli Gallen-Kallelan suomenkielistä korupainosta varten tekemien ornamenttien koristamana on samaa ajatonta arvokkuutta ja kauneutta kuin Divina Comedian esperantonkielisessä käänöksessä, johon liittyy Sandro Botticellin kuvitus.

Esperantonkielinen Kalevala julkaistiin 1964. Painos on loppunut joitakin vuosia sitten. Nyt Kalevalan suurena juhlavuotena 1985 ilmestyy siitä toinen painos. Sitä ei runoilija Joh. Edv. Leppäkoski kuitenkaan ehtinyt nähdä, sillä hänen elämänsä päättyi 5.12.1984.

Kalevalan merkitys Suomen kirjallisuudelle, kuvaamataiteille, musiikille, koko kulttuurille on arvaamattoman suuri, monet vuosikymmenet Kalevalan ilmestymisen jälkeen kantavat sen kansallishengen leimaa, jota innoitti Kalevalan runojen ihmeellinen kauneus ja lyriikka. Mikä osa Kalevalalla on Suomen itsenäisyyden saavuttamisessa lienee vaikeata määrittellä, pie-

nen pohjoisen kansamme tunnetuksi tekemisessä suuren maailman valtaväylillä on Kalevalan innoittamalla merkkimiehillämme joka tapauksessa oma merkityksensä. Nyt, kun esperanton taitajia on kaikissa maanosissa, nykyisin lähes 100 maassa, Kalevala esperantoksi käännettynä voi tavoittaa yhä uusia maita ja kansoja ja samalla välittää suomalaisen kansanrunouden iki-ihanaa luonnonlyriikkaa ja elämänviisautta sellaisillekin, jotka eivät muulla tavalla niihin voisi tutustua, ja samalla tehdä tunnetuksi muinaisten runolaulajien etäistä maata.

Esperantonkielinen Kalevala merkitsee myös muuta, tärkeämpää kuin osataan päätellä. Se osoittaa kiistattomasti, että suunnitelmakieli, L. L. Zamenhofin esperanto on kulttuurikieli, elävä ja käyttökelpoinen, täysin ilmaisukykyinen ja vivahdusrikas. Oriento-Okcidento -sarjaan kuuluvana Kalevala kauniilla tavalla osoittaa, mikä merkitys esperantolla nykypäivänä on pyrittäessä rakentamaan kulttuuriyhteyksiä eri maanosien ja rotujen välillä ja välittämään vaiutteita yli erottavien rajojen, ennen kaikkea yli kielten aiheuttamien rajojen.

Irja Klemola

*Kalevalaseuran 45. vuosikirja 1965,
tekijä täydentänyt 1985*

El la libroservo de UEA,

http://katalogo.uea.org :

Titolo Kalevala

Kategorio Poezio tradukita

Prezo 12.00 e, sesona rabato ekde 3 ekz.

Eldonloko, jaro Helsinko, 1985 (2a eld)

Eldoninto EAF

Klarigoj La fama finna nacia epopeo, kies karakteriza ritmo multe influis poetojn en plej diversaj landoj. La formfidelaj traduko legiĝas kvazaŭ bona romano.

Tradukisto, lingvo J.E. Leppäkoski /

El la finna

ISBN/ISSN 951900551X

Formato 392 paĝoj, 22 cm

Karakterizoj Ilus. Bind. Serio Oriento-Okcidento, n-ro 4

Google Translate aldonis Esperanton

Google Translate interface showing the translation of a Finnish sentence about the Esperanto movement in Finland. The source text is in Finnish and the target text is in Esperanto.

From: Esperanto To: Finnish Translate

Esperanto English Spanish Finnish German English

EAF estas la landa asocio de Esperanto en Finnlando. Ni festas hodiaŭ la tagon de Kalevala, nacia epopeo kompilita 1849 de Elias Lönnrot kaj aldonita laste 1985 en bela traduko de Edvard Leppäkoski.

EAF on kansallinen yhdistys esperanto Suomessa. Juhlimme tänään päivä Kalevalan kansallisen eepoksen koontut 1849 Elias Lönnrot ja julkaistiin hiljattain 1985 kauniissa käännös Edvard Leppäkoski.

Okaze de la 125-jara jubileo de Esperanto kaj ene de la Internacia Semajno pri Amikeco je la 22a de februaro la internetgiganto Google aldonis Esperanton kiel 64an lingvon en sia tradukilo Google Translate (<http://translate.google.com/#eo>).

Kiel *Thorsten Brants*, esploristo ĉe la Guglo-tradukilo, skribas en la blogo googlettranslate.blogspot.com: *Hodiaŭ ni aldonas Esperanton al Google Translate, kaj tiel faras ĝin nian 64an subtenitan lingvon. Ludoviko Lazaro Zamenhof komencis sian serĉon por facile lernebla lingvo dividota inter ĉiuj homoj en la 1870aj jaroj kaj unue publikigis la ideojn en 1887 per sia libro "Unua libro". La koncepto de komuna lingvo disvastiĝis rapide, kaj komencaj reagoj al Esperanto variis inter subpremado ĝis entuziasma adopto. Nun, 125 jarojn poste, Esperanto havas centmilojn da aktivaj parolantoj, milionoj da homoj kun ioma scio de la lingvo kaj eĉ kelkajn cent homojn kiuj lernis ĝin ekde ilia naskiĝo, instruitaj pere de iliaj gepatroj. Esperanto kaj Google Translate dividas la celon helpi homojn kompreni unu la alian, tiu ligo estis farita eĉ en tiu ĉi blogero. Tial ni tre ekscitiĝas ke ni povas oferti tradukon al ankaŭ tiu lingvo. La teamo de Google Translate fakte surpriziĝis pri la alta kvalito de maŝina tradukado por Esperanto. Kiel ni scias de multaj eksperimentoj, pliaj trejnadaĵ datumoj (kiuj en nia kazo signifas pliajn ekzistantajn tradukojn) tendencas rezulti en pli bonaj tradukoj. Por Esperanto la nombro de ekzistantaj tradukoj estas kompareble malgranda. La germana aŭ hispana ek-*

zemple havas pli ol 100-oble pli da datumoj; aliaj lingvoj pri kiuj ni fokusas niajn esplorajn penojn havas similajn kvantojn da datumoj kiel Esperanto, sed ankoraŭ ne atingas kompareblan kvaliton. Esperanto estis konstruita tia ke ĝi estas facile lernebla por homoj, kaj tio ŝajnas helpi ankaŭ al aŭtomata tradukado. Kvankam la sistemo estas ankoraŭ ne perfekta, ni esperas ke nia plej lasta aldono helpos al vi lerni pli pri la historio kaj kulturo de Esperanto. Tradukado al kaj el Esperanto baldaŭ haveblas en translate.google.com, en nia mobilreta aplikaĵo kaj en la Google Translate-programoj por Android kaj iOS.

Per tio eblas (laŭ iuj: finfine) uzi la aŭtomatan tradukon ankaŭ de esperantotekstoj al kaj el multaj lingvoj kaj tiel atingi grandegan kulturan, informan kaj sciencan trezoron, kvankam kompreneble necesas esti prudenta pri la ne perfektaj aŭ foje amuzaj rezultoj. Eblas aldoni la tradukilon facile al retejoj (kaj tiel internaciigi ilin), al la foliumilo (kaj tiel uzi la tradukilon kiel vortaron) aŭ por traduki esperantotekstojn al aliaj lingvoj.

Bela eco estas, ke eblas per alklako de vortoj elekti alternativajn tradukojn, aŭ aldoni proprajn korektojn – tiamaniere la kvalito de la tradukoj daŭre pliboniĝos kunlabore.

Utiligu la ŝancon, montru al aliaj pri Esperanto, kiu jam estas grava lingvo inter dekoj ankaŭ sur aliaj kampoj kiel Vikipedio aŭ uzo en retpaĝoj – eĉ se nur ludece aŭ pro scivolemo. Nia kunlaboro helpas al plia utilo de la tradukilo de monde konata entrepreno, kiu evidente subtenas Esperanton.

Robert Bogenschneider



Mortis Stephanie Strunjak

Ĉenis terura novaĵo el Kroatio. Juna virino *Stephanie Strunjak* pereis en aŭtoakcidento lastsabate, 11an de februaro. Ŝi partoprenis al la fabelkonkurso de Paatalo-instituto trifoje en la jaroj 2000–2002 kaj ĉiu-jare gajnis la premion, en la jaro 2002 la premion "La Fabelo Internacia" per la fabelo "Kiel formikbebo savis formikejon kaj kontaktiĝis kun Avo Frosto". Ŝi partoprenis kun ŝia instruistino *Judita Rey-Hudecek* al la premio-festo en *Taivalkoski*, Finnlando. Gazetoj, televido kaj radio informis vaste pri la vizito kun la titolo "Stefani vojaĝis al ŝia propra fabelo", kiam en la jaro 2000 ŝi verkis la fabelon "Negreĝino". Post la vizito ŝi verkis la fabelon "Pikec kaj Paulina", en kiu aventuras knabino Paulina kaj nano Pikec.

Stephanie estis nia stelo dum multaj jaroj. Ankaŭ en ŝia propra urbo ŝi iĝis konata, ŝi eĉ estis elektita kiel "La zagrebanino de la jaro" post la sukcesoj en la fabelkonkurso.

En nia ZEO, Arbaro de Zamenhof, estas la ŝildo "Arbo de Kroatio" kiun Stephanie kaj Judita elektis, la ŝildo "Arbo de amikeco" kiun Stephanie kune kun la infanoj de nia vilaĝo elektis, kaj la ŝildo "Arbo de Joulupukki" kiun elektis la Kristnaska Avo kiu vizitis nian arbaron samtempe kun Stephanie, honore al ŝia vizito.

Ni ĉiuj esperantistoj en Finnlando memoras Stephanie kiel tre bonan knabinon kaj amikinson. Ni estas dankemaj pro tio ke ni povis konatiĝi kun Stephanie. Al mi estis ebleco loĝi en ŝia hejmo en Zagrebo dum la UK 2001. Dankon, Stephanie. Donu Dio fortojn al la familio.

Kondolence al la familio, parencoj, geamikoj, al la Kroata Esperanto-Ligo

Aini Vääräniemi

*kultura helpanto, organizanto de la Fabelkonkurso
Päätalo-Instituto, Taivalkoski, Finnlando*

Someraj kursoj en Svedio



Someraj kursoj en Lesjöfors (meze inter Stokholmo kaj Oslo) inter la 8a kaj 15a de julio.

Okazos kursoj trinivelaj: komencanta, daŭriga kaj konversacia. Krome: infana ludgrupo, temogrupo pri sano kaj vivmedio, ekskurso. Kiel kursano vi rajtas inviti viajn familianojn aŭ amikojn veni turismi en la bela regiono Värmland dum la semajno antaŭ aŭ post la kursoj kaj tranokti kun 50%a rabato.

Detaloj pri prezoj (la kurso mem estas senpaga): egarden@esperanto.se.

Douglas Draper

Valamo-kurso alvokas denove – Tervetuloa jälleen Valamon esperantokurssille!

**Valamon kansanopiston esperanto-kurssit järjestetään
kesäkuussa 10.–15.6. ja ennen kurssiviikkoa otetaan
vauhtia Naantalista, Turusta ja Helsingistä.**

Kesän 2012 kurssin opettajina ovat tutut Atilio Orellana Rojas ja kurssivastaava Tiina Oittinen, jotka yhteistyössä opettavat kaikkia kurssitasoja. Oppituntien lisäksi kurssiviikolla on tutustumisretkiä ympäristöön, yhteisiä illanviettoja ja muuta ohjelmaa. Kielikurssiviikko Valamossa ei ole pelkästään luokassa istumista ja opetuksen seuraamista. Oppilaat saavat intensiiviopetusta kaikissa vaiheissa ja voivat milloin vain kysyä jotain mieltään vaivaavaa asiaa opettajilta. Esperantoa käytetään myös tauoilla, ruokailessa, retkillä ja illanvietoissa, toki kaikki kerrotaan myös suomeksi. Usein on mukana ulkomaalaisia, joiden kanssa keskustellaan esperantoksi ja kerrotaan Suomesta ja suomalaisuudesta.

Ennen kurssia tehdään parin päivän retki 7.–8.6. Turun seudulle, jolloin vierailaan mm. Naantalın Muumimaailmassa. Lauantaina 9.6. kurssilaiset voivat kokoontua Helsinkiin kannustamaan KER-tutkintoon osallistuvia sekä mahdollisuuksien mukaan mennä mukaan Helsingin Esperantoseuran retkelle Kaunissaareen. Heinävedelle matkustetaan yhdessä 10.6. vuor bussilla.

Valamon kurssi alkaa sunnuntaina, jolloin tutustaan alueeseen ja vietetään tutustumisilltaa. Oppitunnit alkavat maanantaina klo 9.00, jolloin on ensin kurssin esittely ja ryhmiin jakautuminen. Kurssiviikon hinta 280 e sisältää opetuksen lisäksi majoituksen aamiaisineen 1 hh vierasmajassa, retkikahvit ja valamolaisen illan ruokailun. Muita ruokailuja varten voi ostaa edullisen ateriapaketin. Kurssiviikko päättyy perjantaina puolenpäivän aikaan.

Lisätietoja kurssista, Naantali-Turku-Helsinki-retkestä sekä myös ohjelman ja Valamon

kurssiesitteen saa ottamalla yhteyttä kurssivastaavaan. Suomea osaavat voivat ilmoittautua suoraan Valamoon. Ilmoita kuitenkin myös kurssivastaavalle, että olet tulossa, se on tarpeen kurssin suunnittelussa.

Kurssin yhteyshenkilö on kurssivastava ja liiton sihteeri Tiina Oittinen (puh 050-5494709 tai eafsekretario@esperanto.fi, muut yhteyshenkilöt lehden sivulla 2).

Valamon luostarin ja kansanopiston tiedot: Valamon kansanopisto Osoite: Valamontie 42, 79850 Uusi-Valamo, puh.: (017) 5701 810 (myyntipalvelu, klo 9–16), sähköposti: opisto@valamo.fi, kotisivu www.valamo.fi.

Tervetuloa uudet ja vanhat Valamon-kävijät! Kertokaa kurssista ystäville ja tuttaville!

La Esperanto-kursosemajno en la Popola Instituto de Valamo en komunumo Heinävesi estos aranĝita venontjare jam la 12an fojon. La instruado okazos en mirinda monaĥejo atmosfero, kun kiu jam konatiĝis pli ol 100 homoj dum la pasintaj jaroj. La ĉefinstruisto estos denove Atilio Orellana Rojas kun helpo Tiina Oittinen, kiu estos ankaŭ kursorespondeculo.

Antaŭ la kursosemajno okazos dutaga antaŭlekkurso 7.–8.6. en Naantali-Turku regiono, kun i.a. vizito ĉe Muminoj en Muminmondo. Sabate 9.6. la kursanoj kolektiĝos laŭvole al Helsinki por ekzemple instigi la partoprenantojn de KER-ekzameno, viziti la ekskurson de EKH aŭ alie renkontiĝi. Al Heinävesi oni vojaĝos kune dimanĉe 10.6. per la publika buso.

La kursosemajno en Valamo de Heinävesi komenciĝos dimanĉe, la 12an de junio, kiam ni konatiĝos kun la areo espereble denove kun nia esperantlingva ĉiĉerono Jukka Laaksonen. Poste estos la interkona vespero.

La semajno en Valamo ne estas nur studado en la klasĉambro. Dum la lecionoj ĉio ajn eblas. La instruistoj estas je via dispono ne nur tiam, vi povas ankaŭ alitempe, ekzemple dum manĝopaŭzoj, konversacii kun ili. Dum la libertempo estos komunaj vesperoj, ekskursoj en la areo kaj eĉ eksteren, saŭnumadon ktp.

En la lasta vespero ni havos festan vespermanĝon kun diversa programo. Kunprenu vian instrumenton, se vi ludas iun. Ankaŭ prezentadoj de fotoj ktp eblas dum la vesperetoj.

La kursofino estos tagmeze en vendredo la 15an de junio.

Prezo de la kursosemajno estas 280 eŭrojn inkl. instruadon, tranoktadon kun matenmanĝo, festan vespermanĝon kaj ekskursan kafon. Favorpreza manĝopaketo haveblas por aliaj manĝoj. Se vi parolas la finnan, vi povos aliĝi rekte al la Popola Instituto. Bonvolu informi ankaŭ al ni pri via aliĝo, ĉar por la kursoplanado necesas scioj pri la kursanoj. Al antaŭekurso bonvolu aliĝi al la kursogvidanto.

Kontaktulo estas kursogvidanto Tiina Oittinen, sekretario de EAF, adreso: Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, Finnlando, tel: +358-2-2305319, eafsekretario@esperanto.fi. Petu de ŝi aliĝilon kaj programon por la kursosemajno. Pliaj informoj ankaŭ en www.esperanto.fi.

**Bonvenoj novaj kaj malnovaj Valamo-anoj!
Rakontu pri la kurso kaj antaŭekurso al viaj gekonatuloj!**

Tiina Oittinen

PRI (RE)ABONO ESPERANTA FINNLANDO POR 2012

La jarkunveno 11.3. de EAF decidis pri la membrokotizo de individuaj membroj, estas daŭre 20 eŭrojn. La kotizo enhavas la gazeton. Kiel individua membro vi ricevos de la kasisto leteron kun pagilo kaj referencnumero.

Ankaŭ multaj membroasocioj jam havis jarkunvenojn kaj fiksis la membrokotizojn. La gazeto kostas por vi 14 eŭrojn, se vi abonas ĝin tra via asocio (notu ke kelkaj membroasocioj aŭtomate inkluzivas la gazeton en la membrokotizo).

Se deziras kiel nova membro deziras aboni la gazeton, bonvolu informi al EAF aŭ al via membroasocio. Kontaktinformoj en la internaj kovrilpaĝoj.

Ĝuu la legadon!

Estraro de EAF

NOTU, KE TIU ĈI NUMERO 2/2012 ESTAS LA LASTA KIUN VI RICEVAS EN 2011 SEN REABONO.

ESPERANTOLEHDEN TILAAMISESTA VUONNA 2012

Suomen Esperantoliiton (EAF) vuosikokous sunn. 11.3. päätti pitää henkilöjäsenen jäsenmaksun edelleen 20 eurossa. Maksuun sisältyy Esperantolehti. Henkilöjäsenenä saat rahastonhoitajalta jäsenmaksukirjeen viitenumeroineen.

Monet jäsenyhdistykset ovat jo pitäneet vuosikokouksen ja päättäneet vuoden jäsenmaksuista. Esperantolehti maksaa 14 euroa jäsenyhdistyksen jäsenelle ja jäsenyhdistys hoitaa lehden tilaamisen (huomaa, että joidenkin järjestöjen jäsenmaksuun lehti sisältyy automaattisesti).

Jos olet uusi jäsen ja haluat tilata Esperantolehden, ilmoita siitä joko liitolle tai omalle jäsenyhdistyksellesi. Yhteystiedot kansilehtien sisäsivulla.

Hyviä lukuhetkiä!

Liiton hallitus

**HUOMAA, ETTÄ TÄMÄ LEHTI NRO 2/2012
ON VIIMEINEN, JONKA LÄHETÄMME
VUONNA 2012, JOS TILAUSTA EI OLE
UUDISTETTU.**

Teksto por "La Komencanto", Rusio: Unuaj paŝoj en mirinda mondo

Kiam mi estis juna knabo, mi ofte vidis informojn pri Esperanto. Ĉar mi interesiĝis pri lingvoj kaj pri novaj aferoj ĝenerale, mia sinteno al la ideo pri facila internacia lingvo certe estis pozitiva ekde la unua fojo, kiam mi legis pri Esperanto. Mi eklernis ĝin, kiam mi estis 15-jara. La decidan puŝon donis unu el miaj hobiaj, aŭskultado de eksterlandaj radiostacioj. Ĉar mi scipovis nur la finnan lingvon, mi povis sekvi nur la programojn de tiuj stacioj, kiuj dissendis en la finna. Unu el ili estis la Pola Radio. Okazis, ke ĝia finna elsendo komenciĝis tuj post la Esperanta elsendo. Por ne perdi la komencon de la finna elsendo mi serĉis la ondolongojn de Varsovio en mia radioricevilo tiel frue, ke mi ofte aŭdis la vortojn: "Finiĝas nia elsendo en Esperanto". Tiel mi malkovris, ke Esperanto estas vivanta lingvo, ĉar ne estus radioprogramoj en ĝi, se ili ne havus aŭskultantojn. En gazeto de finnaj DX-aŭskultantoj ¹⁾ mi legis, ke ankaŭ aliaj stacioj elsendas en Esperanto. Mi jam sciis, ke Esperanton oni povas lerni rapide. Do, mi tuj eklernu ĝin kaj baldaŭ estos pli da radioprogramoj, kiujn mi povos aŭskulti kaj kompreni!

Mi iris al la librovendejo de mia vilaĝo kaj diris al ĝia posedantino, ke mi volas lerni Esperanton kaj bezonas lernilon. Ŝi esploris en katalogoj kaj trovis la titolon *Esperanto-kurso*, malgranda libreto de Vilho Setälä, kies lecionoj estas popolaj fabeloj. Mi petis ŝin mendi du ekzemplerojn, ĉar mia plej bona amiko el la sama lerneja klaso volis studi kun mi. Baldaŭ la libretoj alvenis kaj la 6-an de januaro 1966 ni povis eklerni. Bedaŭrinde la fervoro de mia muzikema amiko daŭris nur du-tri monatojn, ĝis li ŝanĝis Esperanton al ludado en rokbando.

Du jarojn poste mi membriĝis en UEA. Mi havas plurajn hobiajn kaj membris en organizaĵo de ĉiu el ili. Finnoj estas organiziĝemaj, do ankaŭ mi. En la kazo de miaj aliaj hobiaj mi estis membro de loka sekcio, sed kiel esperantisto mi vo-

lis rekte aparteni al la monda organizaĵo. Kiam mi skribis al la ĉefdelegito de UEA por demandi pri la membrototizo, mi ne kuraĝis skribi Esperante, ĉar mi timis, ke estus honto fari erarojn en letero al tiel grava homo. Li respondis en Esperanto kaj diris, ke mi ĉiam skribu Esperante, ĉar nur tiel mi ellernos la lingvon. En la tago, kiam mi ricevis mian unuan Jarlibron, tiun de la jaro 1968, mi estis plena de fiero. Mi tralegis ĝin ekde la unua ĝis la lasta paĝo, ankaŭ la adresojn de la delegitoj, kaj mi sentis esti membro de nova, mirinda mondo. Jarlibro 1969 jam estis pli normala afero kaj en ĝi mi legis nur la informojn, kiujn mi bezonis.

Unu el la utilaj informoj de la Jarlibro temis pri Koresponda Servo Mondskala de UEA. Pere de ĝi mi ricevis adresojn de junaj esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Francio, Japanio kaj Sud-Koreio. Mi vigle korespondis kun ili. Unu el ili nun estas elstara movadano, nome Sibayama Zyun'iti, kiu estas prezidanto de Japana Esperanto-Instituto.

En la jaro 1969 la 54-a Universala Kongreso okazis en Helsinko, la ĉefurbo de mia lando. Jam en la antaŭa jaro mi aliĝis al ĝi kaj ekŝparis por partopreni ĝin. Estis granda aventuro por mi, ĉar eĉ en Helsinko mi neniam antaŭe estis. Mi ankaŭ ne havis sperton pri interparolado en Esperanto, ĉar ĝis tiam mi povis konversacii kun neniuj. Mia sola sperto estis la aŭskultado de radioelsendoj. Kiam mi venis al la kongresejo, mi vidis la plej eminentan finnan esperantiston, akademianon Vilho Setälä antaŭ la ĉefa enirejo. En tiu momento mi decidis, ke li estu la unua, kun kiu mi parolos en Esperanto. Estis ja ĝuste li, per kies lernolibro mi lernis la lingvon. Mi longe pripensis miajn frazojn, kolektis la kuraĝon, iris al li kaj diris: "Bonan tagon! Mi ĵus venis kaj ne scias, kion mi devas fari." Setälä montris giĉeton, kie oni disdonis kongresajn dokumentojn. Poste li demandis, el kiu lando mi estas. Mi diris mian nomon kaj ke

mi estas finno. Tuj li memoris, ke mi jam verkis recenzon pri la libro "Vivo de Gandhi" de E. Privat por "Esperanta Finnlando", kies redaktoro li estis, kaj li laŭdis ĝin. Tiel promesplene komenciĝis neforgesebla semajno, dum kiu mi renkontis samideanojn el multaj landoj. Ĉar miaj oreloj jam al kutimiĝis al radioelsendoj, mi senprobleme komprenis ĉion kaj mia propra parolkapablo rapide progresis. Plej multe da tempo mi pasigis kun japanoj, ĉar ili estis por mi, kampara knabo, io unika kaj neniam spertita. Eĉ kun Ivo Lapenna mi parolis. En tiu semajno mi vere eniris Esperantujon.

Antaŭ la UK mi skribis unuafoje al la Pola Radio, kvankam mi estis ĝia aŭskultanto jam longe. Mi rakontis, ke mi fariĝis esperantisto dank' al la Pola Radio. Je mia granda surprizo mia letero estis premiita kiel la plej interesa letero de la monato. La premio estis la verko "La faraono" de la pola aŭtoro Prus en la fama traduko de Kabe. Antaŭ ol vojaĝi al mia unua UK

mi tralegis ĝin. Ĝi estas atentokapta verko kaj facile legebla. Kiam mi legis ĝin, mi uzis "metodon", kiun mi uzis ankaŭ ĉe aliaj libroj kaj artikoloj. Nome, kiam mi renkontis nekonatajn vortojn, mi ne tuj rigardis en la vortaro, sed mi plu legis. Kiam mi fine interrompis la legadon, mi klopodis memori la novajn vortojn kaj nur tiam mi serĉis ilian signifon en vortaro. Ofte la vortoj tiel plurfoje ripetiĝis, ke mi malkovris ilian signifon dum la legado. Multajn jarojn poste, kiam mi laboris en la Centra Oficejo de UEA, mi legis, ke en la antaŭmilita laborista Esperanto-movado de Nederlando oni diris, ke por esti vera esperantisto necesas legi "La faraonon". Mi ĝojis konstati, ke mi fariĝis vera esperantisto jam kiel lerneja knabo!

Osmo Buller 2004-02-23

1) fakvorto por aŭskultanto de eksterlandaj radios-tacioj, kiuj elsendas sur mallongaj aŭ mezlongaj ondoj

ELFI kunsidis en Riihimäki kaj lanĉis sian 90-jaran historion

Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj (ELFI) havis sian jarkunkunsidon dum la Vintraj Tagoj en Riihimäki 10.3.2012. La laŭstatutaj aferoj estis traktitaj dum ĉeesto de deko da partoprenantoj.

La nova estraro de ELFI estas jena:

- prezidanto *Sylvia Hämäläinen* el Tampere
- vicprezidanto *Raita Pyhälä* el Hyvinkää
- sekretario *Tapani Aarne* el Tampere
- kasisto kaj vicmembro *Terhi Laaksonen* el Tampere
- ordinaraj membroj *Tuomo Grundström* el Rauma kaj *Tiina Oittinen* el Turku
- vicmembro *Carola Antskog* el Kimito.

La historio (1921–2011) de ELFI estas presita. Ĝi estas verkita de *Sylvia Hämäläinen*. La libro inkluzivas pli ol 100 paĝojn kaj la prezo estas po 5 eŭroj por la unua ekzemplero por la membroj de ELFI kaj po 10 eŭroj por aliaj. Rigardu apartan informon.

En la kunsido *Jorma Ahomäki* estis elektita kiel honora membro de ELFI pro lia grandega kaj

longtempa laboro por Esperanto.

ELFI aranĝos tutmondan skriban UEA/KER ekzamenon sabaton la 9an de junio je la 10a horo en Helsinko samtempe kun 18 alilandaj grupoj. Pliaj scioj de la prezidanto, kies kontaktadreso estas sur la antaŭlasta paĝo de Esperantolehti.

Se vi deziras membriĝi en ELFI kaj tiel subteni la laboron por instruado de Esperanto en Finnlando, jen la membrotitoloj:

- MIPR-membro 28 eŭroj (ricevas papere la revuon IPR de ILEI)
- MJA-membro 28 eŭroj (IPR rete kaj eduka gazeto Juna Amiko papere)
- MI-membro 15 eŭroj (IPR rete).

ELFI deziras instigi membriĝi speciale tiujn, kiuj instruas Esperanton aŭ/kaj gvidas diskut-kaj studrondojn. Kontaktinformojn de ELFI estas sur la antaŭlasta paĝo kaj pliaj informoj ĉe la retejo de ELFI www.esperanto.fi/elfi/Etusivu.

Estraro de ELFI

Vintraj Tagoj 2012 en Finnlando

Riihimäki estas urbeto naskita de fervojo, trafika nodo sesdek kilometrojn norde de Helsinko. La tradiciaj vintraj tagoj de EAF kolektis tie kvardekon da esperantistoj semajnfine 10.–11. de marto. Sed tiom nur fizike; rete partoprenis pliaj. *Katalin Kováts* donis retan prelegon pri instruista trejnadado ĉe Edukado.net (RITE), kaj sub la gvido de *Anna Löwenstein* ni vagadis en la reta mondo Dua Vivo kun kelkaj samideanoj. Estis nova sperto al plejmulto.

Nova estis ankaŭ filma metiejo: *Keith Uber* reĝisoris produktadon de kvin filmetoj, videoklipoj, per plej simplaj iloj. Ĉiu fariĝis stelulo! Vidu en **youtube** per serĉo 'esperanto eaf' kaj vi trovos. En unu el la filmetoj stelas ankaŭ la plej simpatia ano de la tagoj, hundeto *Tarmo* ('Enerĝio').

La ĉefa novaĵo dum la Tagoj tamen estis malnova, je 90 jaroj: *Sylvia Hämäläinen* prezentis la historion de nia ILEI-sekcio, kaj estis publikigita ŝia 109-paĝa libro 'Ni semas kaj semas... Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj 1921–2011'. La esperantlingva verko – kun ampleksaj resumoj en la finna kaj sveda – estas mendebla ĉe EAF (esperanto.fi).

Estis prezentita ankaŭ la projekto "Esperanto 125" kaj lanĉita speciala poŝtmarko kun ties emblemo. Ne de la landa poŝto, sed speciale mendita de la asocio. La malgranda eldono elvendiĝis, pli mendigis – filatelistoj vidu en la EAF-hejmapaĝo.

La dimanĉa jarkunveno de la asocio reelektis Tuomo Grundström prezidanto. Nove estis elektitaj en la estraron *Tapani Aarne* el Tamperre. Ceteraj anoj estas *Päivi Saarinen*, *Tiina Kosunen*, *Paula Niinikorpi*, *Tiina Oittinen*, *Jukka Nikoskelainen*, *Börje Eriksson*, *Keith Uber* kaj *Robert Bogenschneider*.

La asocio kelkfoje nomumis Aganton de la jaro. Nun estis distingitaj du Merituloj de multaj jaroj: *Mikko Mäkitalo* kiel redaktoro kaj *Ilkka Santtila* kiel engaĝiganto de Esperantolehti



Fina bufedo en la kafejo.



Partoprenantoj kreas filmetojn.

"emeritiĝis" kaj lasis al siaj sekvantoj en la redakta grupo grandan defion teni la nivelon.

La Tagoj estis finitaj ekskurse al la Finnlanda Muzeo pri Vitro, la ĉefa vidindaĵo en tiu (eks)industria urbo.

Tuomo Grundström



Ilkka Santtila iĝas Elstara Aganto.



UEA nun en konsulta partnereco kun UNESKO

Universala Esperanto-Asocio fariĝis konsulta partnero de

Unesko, la Organizo de UN por Edukado, Scienco kaj Kulturo. Tiel decidis la Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ino Irina Bokova, konforme al la novaj gvidlinioj pri la rilatoj de Unesko kun Ne-Registaraj Organizaĵoj (NRO-j), kiujn la Ĝenerala Konferenco adoptis en novembro. Fakte, laŭ la novaj gvidlinioj ne plu temas pri rilatoj sed pri partnereco por pli bone esprimi, ke Unesko celas kunlabori kun NRO-j por la komunaj celoj kaj ne nur formale rilati kun ili. Por Unesko NRO-j estas gravaj, ĉar pere de ili ĝi rekte atingas la civilan socion preter la ŝtataj strukturoj.

UEA havas oficialajn rilatojn kun Unesko ekde 1954. Antaŭe estis tri kategorioj: apud la plej alta el ili, formalaj asociaj rilatoj, ekzistis formalaj konsultaj rilatoj kaj operaciaj rilatoj. UEA troviĝis en tiu lasta kategorio. Ekde nun estas du kategorioj: asocia kaj konsulta partnereco. En la unua estas akceptataj nur malmultaj grandaj NRO-j por la periodo de ok jaroj. La konsulta partnereco ne estas tempe limigita, sed la koncernaj NRO-j devas montri konstantan aktivecon kaj daŭre kontribui al la agadoj de Unesko je ties plena kontento. Por ke la partnereco estu sur firma kaj serioza bazo, Unesko asignas ĝin nur al NRO-j, kiuj havas establitan centran oficejon kaj plenumas ankaŭ aliajn postulojn.

La plej longedaŭra kontribuo de UEA al Unesko estas la eldonserio *Oriento-Okciden-*

to, en kiu ekde 1961 aperis 49 elstaraj mondliteraturaj verkoj en Esperanta traduko. UEA esperantigis kaj eldonis ankaŭ librojn k.a. materialojn de Unesko. La temo de la Universala Kongreso estas ofte ligita al speciala jaro aŭ jardeko de Unesko kaj la temo estas pritraktata en kongresaj programoj. Multaj UK-oj ricevis mesaĝon de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, laste la 96-a UK en Kopenhago. UEA partoprenis en diversaj kampanjoj de Unesko; ekz. en la kolektado de subskriboj por la Manifesto 2000 por Kulturo de Paco kaj Senperforto ĝi estis inter la plej aktivaj NRO-j.

Pro sia oficiala statuso UEA havas pli facilan aliron al la Ĝenerala Konferenco kaj aliaj aranĝoj de Unesko. La plej elstaraj kaj daŭre valoraj atingoj de UEA ĉe Unesko sendube estas la rezolucioj de la Ĝeneralaj Konferencoj en Montevideo en 1954 kaj en Sofio en 1985 kiel la internacie plej gravaj rekonioj al Esperanto kaj Universala Esperanto-Asocio.

La konstantaj reprezentantoj de UEA ĉe la sidejo de Unesko en Parizo estas Renée Triolle, Barbara Despiney kaj François Lo Jacomo. Unesko estas en oficiala partnereco kun 369 internaciaj NRO-j.

Noto: Pri la nova statuso de UEA ĉe Unesko oni povas uzi tri esprimojn: UEA havas la statuson de konsulta partnereco kun Unesko; UEA estas en konsulta partnereco kun Unesko, aŭ UEA havas konsultan statuson ĉe Unesko.

[GK 445]



Distingon al "Elstaraj Agantoj"

La estraro de EAF transdonis al la longjara enpaĝiganto de la asocia organo Esperanto-lehti, *Ilkka Santtila*, kaj la antaŭa ĉefredaktoro *Mikko*

Mäkitalo diplomojn kiel "Elstaraj Agantoj" pro iliaj grandaj meritoj teni altan nivelon de nia gazeto. Multan dankon al ilia vojomontra agado.

Ĉar Mikko ne povis ĉeesti en la Vintraj Tagoj, li ricevis sian diplomon en Turku, transdonita de la asocia sekretario *Tiina Oittinen* kaj nova estrarano *Jukka Nikoskelainen*.

Jubileoj de la Centra Oficejo kaj Esperanto en la Malferma Tago

La 36-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 28-an de aprilo atentis la 50-an datrevenon de la transloĝiĝo de la sidejo de UEA al Nieuwe Binnenweg 176, sendube la plej fama adreso en Esperantujo. La CO venis al Roterdamo jam en 1955, sed komence ĝi funkciis en luita domo. La nuna domo estis aĉetita fine de 1961 kaj la oficejo ekfunkciis tie en aprilo 1962.

Kiel estrarano de TEJO kaj UEA kaj pro siaj esploroj kiel historiisto, d-ro Ulrich Lins vizitis la Centran Oficejon multfoje dum preskaŭ la tuta 50-jara periodo en ties nuna domo. Dum la Malferma Tago li rememoras pri siaj vizitoj, pri famaj kaj malpli famaj personoj, kiujn li renkontis, kaj pri movadaj eventoj, en kiuj la CO ludis rolon. Pri la strato mem rakontas Osmo Buller, montrante specimenojn el sia kolekto de bildkartoj pri Nieuwe Binnenweg, unu el la plej historiaj stratoj de Roterdamo.

Kompreneble ne povos manki atento al la 125-a datreveno de la apero de la Unua Libro de Esperanto, prifestata ĉi-jare. Stefan MacGill, prezidanto de ILEI, rakontas pri la naskiĝanta “Kurso 125”, reta Esperanto-kurso speciale

kreata lige kun la datreveno. Pri la agado lige kun la jubileo informos kaj respondos demandojn ankaŭ la estraranoj de UEA. La tuta Estraro sub la gvido de prezidanto Probal Dasgupta ĉeestos en la Malferma Tago, post kiu la estraranoj restos en Roterdamo por tritaga kunsido.

Kiel ĉiam, en la programo estos ankaŭ libreprezentoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.


[GK 447]



Filmoj pri Tibor Sekelj

Ĉi-jare oni prifestas la 100-an datrevenon de Tibor Sekelj, kiu naskiĝis la 14-an de februaro 1912 kaj forpasis la 17-an de septembro 1988. Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) proklamis la jaron 2012 Jaro de Tibor Sekelj kaj la Komitato de UEA instigis la Esperanto-organizaĵojn atenti la jubileon kaj diskonigi la vivoverkon de tiu mondvojaĝanto, ĵurnalisto, verkisto kaj movada aganto.

Jam pasintjare UEA kontribuis al la informado pri Sekelj per ampleksa artikolo de Zlatko Tišljar en la revuo “Esperanto” (junio 2011) kaj per prelego de Spomenka Štimec en la Malferma Tago de la Centra Oficejo la 26-an de novembro.



La prelego de Spomenka Štimec estis filmita kaj ĝi estas nun spektebla en la Reta Kinejo de UEA. La 40-minutan filmon “De Akonkagvo al Unesko” redaktis Francisco L. Veuthey: <http://vimeo.com/36402930>

[GK 443]

La plej bela poŝtmarko de la jaro 2011



Finnoj elektis ree la plejbelanpoŝtmarkon. En la jaro 2011 la venkinto estis rozbero kun frosta prujno. *Susanna Rumpu* kaj *Ari Lakaniemi* preparis bildon por nova 2a-klasa omakuvapostimerkki de Poŝtkompanio. Oma-

kuvapostimerkki (poŝtmarko laŭ individua mendo) estas poŝtmarko, kiun la kliento aspektigas el propra foto kaj la Poŝto preparas poŝtmarkojn laŭ la mendo.

Venkinta Rozbero (finne *Ruusunmarja*) ricevis preskaŭ 12 elcentojn el 22 471 voĉoj kiujn oni donis en voĉdono.

Dua estis poŝtmarko *Pehmeä joulu* (Mola julo) de *Kaarina Toivanen*. Sur la marko sidas ridanta koboldo inter pluŝaj ludiloj kaj fadenbuloj.

Favorataj estis poŝtmarkoj, kiuj temas pri naturo. Tria estis flava tulipa fasko de

poŝtmarkoartistino *Leena Airikkala*.

Grafika dezajnisto *Klaus Welpin* faris du poŝtmarkojn por la serio de Eŭropa-markoj (PostEurop donas ĉiujare temon kaj multaj Eŭropaj landoj publicas poŝtmarkojn samtempe.) En la jaro 2011 la temo estis arbaroj.

Poŝtmarkoj de Welpin estis kvara kaj kvina en la voĉdono. Poŝtmarko kun printempa kaj somera arbaro ricevis 1708 voĉojn kaj marko kiu montras aŭtunan kaj vintran arbaron ricevis 1417 voĉojn. Sur la bildo estas arbaro el Mustalampi, kiu situas en la nacia parko de Nuuksio en la urbo Espoo.

Aliajn poŝtmarkojn vi povas vidi sur la retpaĝo de la Poŝtkompanio http://www.posti.fi/tiedotteet/2012/20120131_kaunein_postimerkki.html

Tio ĉi estas la unua artikoleto por la jaro 2012. Kiaj temoj plaĉus al vi? Franciska nun dormas pro frosto kaj neĝo, do pri ŝiaj ekskursoj mi skribos poste.

Salla Lappalainen
[tra Ipernity]

125 jaroj da Esperanto - la jubilea jaro



Por festi la 125-jariĝon de Esperanto (Je la 26.7.1887 laŭ la gregoria kalendaro aperis en Varsovio ruslingva broŝuro de iu “Doktoro Esperan-

to”..) la brita Esperanto-asocio kreis jubilean simbolon, kiu estas libere uzbla por diskonigi nian lingvon.

Surbaze de tiu simbolo EAF eldonigis unuak-

lasan poŝtmarkon, kiu estas havebla en la libroservo (Retpoŝte: eafmendoj@esperanto.fi) aŭ la oficejo en Siltasaarenkatu 15 C 65, 00520 Helsinki.

Unuopa marko kostas 2 EUR, strio kun 5 pecoj 9 EUR, kaj tuta folio kun 20 poŝtmarkoj haveblas kontraŭ 35 EUR, aldonendas afranko.

Jen donaco por tiuj esperantistoj, kiuj ankoraŭ uzas paperan poŝton - kaj bona ebleco reklami. Kaptu la okazon!

Robert Bogenschneider

UNESCO deklaris la 13an de februaro "Monda tago de radio" - omaĝe al tiu grava rimedo disvastigi informojn kaj kulturon.

Interrete ekzistas granda gamo da radiostacioj kaj podkastoĵoj - unu el ili estas "Esperanta Retradio" de la aŭstro Anton Oberndorfer (<http://peranto.posterous.com/>), kiu dissendas ĉiutage kelkminutan sendaĵon ankaŭ kun teksto

por laŭtleĝi. Tio estas ideala por komencantoj kaj progresantoj, kiuj alktimigiĝas al la parolata kaj skriba lingvo, kaj samtempe povas ĝui plej diversajn temojn. Jen specimeno de la 15a februaro:

Konvinka parolado

Kiam konatuloj demandas min kiel mi aktive pasigas mian libertempon, mi rakontas al ili ke mi okupiĝas pri la funkciigo de propra retradio en kiu mi disaŭdigas ĉiutage programojn kiuj estas aŭskultataj en la tuta mondo. Al tiu respondo sekvas la demando pri la lingvo kaj mi diras ke temas pri Esperanto.

Antaŭ kelkaj tagoj okazis tia situacio: Kiam mi menciis Esperanton, la sinjorino kun kiu mi parolis, respondis: "Ah, tio ja estas tiu artefari-ta lingvo kiu ne akiris praktikan publikan signifon." Por ne krediĝi al ŝi ke mi okupiĝas pri sensencaĵoj mi respondis jene: "Jes, bedaŭrinde la originaj celoj por la lingvo ne estis atingitaj, sed tamen havas sencon okupiĝi pri tiu lingvo, ĉar ĝi signife levas la senton pri memvaloro. Neniu alia fremda lingvo estas tiel bone kaj altkvalite regebla kiel Esperanto". Mia kunparolantino ne volis kredi tion, sed mi insistis kaj aldonis ke mi ja parolas kelkajn lingvojn, sed nur en Esperanto mi atingis tiun altan gradon de kreivo kaj ĝuo en la parolado de la lingvo.

Ni ne sekvis tiun temon kaj parolis pri io alia. Tiun sinjorinon mi ja ne volis konvinki pri la utileco de Esperanto, sed mi nur volis montri ke Esperanto vivas kaj ke ankaŭ en situacio sen granda publika rekono havas sencon okupiĝi pri tiu lingvo. Kaj mi pensas ke tiu defendema aliro al la demando pri la signifo de Esperanto en la nuntempo servas ankaŭ se oni volas gajni novajn adeptojn por nia lingvo.

La kvanta argumento tute klare parolas kontraŭ Esperanto. Tion ni ne povas kontes-

ti. Ni do bezonas kvalitajn argumentojn. Kaj tia kvalita argumento ne estos ke Esperanto estas pro ĝia granda facileco rapide lernebla, sed necesas diri ke Esperanto estas tiel klare strukturita lingvo ke jam post relative mallonga tempo de lernado kaj praktikado de la lingvo eblas atingi signife pli altan nivelon ol se oni okupiĝus en sama mezuro pri alia fremda lingvo.

Kaj pro la fakto ke E-parolantoj troviĝas ĉie en la mondo oni povas havi lingve altnivelan kontakton kun homoj precipe en ne-anglalingvaj landoj. Mi povas aldoni ke en la Esperanta Retradio daŭre kunlaboras kleraj homoj el Brazilo, Israelo kaj Pollando kaj ke tiu kunlaboro estas tre kontentiga kaj ĝojiga. Ĝuste tiu okupiĝo pri la praktikado de la lingvo montras kiel granda estas la kunliga forto de komuna neŭtrala lingvo.

Mi opinias ke tiel eblas konvinki homojn pri Esperanto kiuj ne suferas iun grandan mankon, sed kiuj ŝatus esprimi sin je alta nivelo kaj kiuj volas komuniki tiucele kun homoj el aliaj landoj. Ni ja akceptu homojn kiuj apenaŭ progresas en la regado de nia lingvo, sed en nia aktiva agado ni alparolu tiajn homojn kiuj havas perspektivon atingi altan nivelon de lingvovogado. Tiel ni povas levi la prestiĝon de nia lingvo kaj malrapide kreskigi ĝian parolantaron.

*Anton Oberndorfer
[Esperanta Retradio*

(<http://peranto.posterous.com/>), 15.2.2012]

Unu jaro pruvas multon

Hodiaŭ estas tago por esti kontenta. Antaŭ precize unu jaro la Esperanta Retradio komencis sian duan vivon kiel memstara sendependa ĉiutaga elsendanto de paroladoj en Esperanto. En la jaroj 1998 ĝis 2006 ĝi reaŭdigis elsendojn de Pola Radio. Komence Pola Radio ja ne uzis la interreton kiel elsendan platformon kaj do pere de la Esperanta Retradio Pola Radio atingis ne nur eŭropajn geaŭskultantojn persatelite sed ankaŭ en aliaj kontinentoj per la interreto, precipe en norda Ameriko kaj en Japanio. Tiu tasko malaperis kiam Pola Radio mem disaŭdigis siajn elsendojn ankaŭ pere de la interreto. Komence de la jaro 2006 mi decidis ĉesigi tiun agadon pro mankanta bezono.

Sed kiam pasintjare la elsendoj de Pola Radio definitive ĉesis mi decidis mem entrepreni ion kaj reaktivigis la Esperantan Retradion. La privata “Pola Retradio en Esperanto” komencis elsendi nur post mia retradio kaj nun ambaŭ funkcias paralele kun tute malsamaj konceptoj. Evidente la koncepto de la Esperanta Retradio estas tre sukcesa. Dum la Pola Retradio disponas pri kunlaborantoj en unu loko, nome en Varsovio, en mia kazo la kontribuoj al la programoj venas de kunlaborantoj el pluraj kontinentoj. Kvankam mi estas aŭstro kaj ankaŭ multaj temoj venas el Aŭstrio, la Esperanta Retradio ne estas esence aŭstra, sed tute klare internacia, eĉ transkontinenta. La temaro estas tre larĝa. Necesas ja alparoli homojn kiuj havas plej diversajn interesojn. Tamen ĉiuj temoj havas komunan trajton: Ili prezentu optimisman vidon de la mondo kaj krome mi volas ankaŭ montri pozitivajn perspektivojn por la evoluo de Esperanto en la mondo.

Mia celo estas ke la penso pri Esperanto veku agrablajn sentojn. Kaj mi estas tre feliĉa ke miaj kunlaborantoj en-

tuziasme transprenis tiun ideon. La kunlaboro funkcias en plena harmonio kaj tiel pruviĝas ke la komuna laboro por kaj en Esperanto estas forta ligilo. Ni laboras por komuna afero kaj celo, nome krei ĝojon per la aplikado de Esperanto je alta nivelo. La reagoj de la geaŭskultantoj konfirmas ke tio estas la ĝusta vojo.

Pri kio mi estas aparte kontenta estas la ekonomia flanko de la afero. La Esperanta Retradio ne havas financajn problemojn, ĉar ne estas iuj kalkuleblaj kostoj kaj tial ne necesas iel kolekti monon. Tamen ĉiutage aperas nova elsendaĵo, tio estas ĝis hodiaŭ 365 sonartikoloj. La geaŭskultantoj povas aŭdi bonan kaj belan lingvon. La lingva nivelo konstante kreskas ĉe ĉiuj. Kaj kreskas la aŭskultantaro. Se komence unu sonartikolo atingis 400 ĝis 500 alklakojn, nun jam tiu nombro kreskis al 1300 ĝis 1700 alklakoj.

Do ĉio montras ke eblas esti kontenta pri la evoluo de la Esperanta Retradio. Restas tamen deziroj: Mi estus tre feliĉa trovi pluajn kontribuantojn kaj estus bele aŭdi aŭ legi iun laŭdan vorton de movadaj gravuloj. Tiu ĉi jubileo estas bona okazo por tio.

Anton Oberndorfer
[Esperanta Retradio

(<http://peranto.posterous.com/>), 28.2.2012]

Sananlaskuviisautta I

Sananlaskuviisautta esperantoksi ja suomeksi – sisältö sama, mutta ei läheskään joka parissa sananmukaisesti. Yhdistä rinnakkaisten palstojen sanalaskut luku kirjaimen tai päinvastoin.

- a** Kun kissa on poissa, hiiret hyppii pöydällä.
b Tyhmästä päästä kärsii koko ruumis.
c Kun hätä on suurin, on apukin lähellä.
ĉ Ylpeys käy lankeemuksen edellä.

- d** Ken härillä kyntää, se häristä puhuu.
e He ovat kuin paita ja peppu.
f Oppia ikä kaikki.
g Valuu pois kuin vesi hanhen selästä.

- ĝ** Ei maistu hongalle eikä haavalle.
h Voimallinen tahto vie miehen läpi harmaan kiven.
ĥ Vaatteet tekevät miehen.
i Rohkea rokan syö, kaino ei saa kaaliakaan.

- j** Tyvestä puuhun nouseaan.
ĵ Kenen leipää syöt, sen lauluja laulat.
k Ei koira karvoistaan pääse.
l Joka kuuseen kurkottaa, se katajaan kapsahtaa.

- m** Oma vika kun on sika.
n Niin makaa kuin petaa.
o Työ tekijäänsä opettaa.
p Niin metsä vastaa kuin sinne huudetaan.

- r** Oma tupa, oma lupa.
s Sitä saa mitä tilaa.
ŝ Ei nimi miestä pahenna, ellei mies nimeä.
t Seura tekee kaltaisekseen.

Proverba saĝo finne kaj esperante – respon-
 daj enhavoj, sed ne laŭvorte. Kunigu nom-
 bron kaj literon aŭ inverse. Ĉu (mal)facile?

Tuomo Grundström

- 1** Ju homo pli fiera, des puno pli severa
2 Kia vivo, tia morto.
3 Kiam kato promenas, la musoj festenas.
4 Kiu devas, tiu povas.
5 Kiu manĝon al mi donas, tiu al mi ordonas.
6 Kiaj kolegoj, tiaj kutimoj.
7 Inter generaloj parolu pri bataloj.
8 Guto malgranda, sed ŝtonon ĝi boras.

- 9** Kapo pekas, piedoj suferas.
10 Kia estas la homo, tia estas lia nomo.
11 Ĝi estas nek viando, nek fiŝo.
12 Kia sono, tia resonado.
13 Kiu ne estis kaporalo, ne estos generalo.
14 Kiel oni sternas, tiel oni dormas.
15 Kiun vesto ornamas, tiun homoj ekamas.
16 Kiu leviĝis fiere, baldaŭ falos al tero.

- 17** Kara estas dono en minuto de bezono.
18 Ĝi tuŝas lin, kiel akvo anseron.
19 Kie mi disponas, tie mi ordonas.
20 Kiu lupu naskiĝis, vulpo ne fariĝos.

- 21** Ili vivas per unu animo en du korpoj.
22 Kiu ne riskas, tiu ne gajnas.
23 Homo lernas tutan vivon.
24 Kiu kaĉon kuiris, tiu ĝin manĝu.

Esperanto-societo en Turku printempe 2012

Esperanto-societo en Turku (EST) havis la laŭstatutan jarkunvenon 19-an de februaro 2012 en la Civitana instituto de Aurala. Elektitaj funkcioj: *Tiina Oittinen*, prezidanto, *Anna-Liisa Ali-Simola*, vicprezidanto, *Leena Tiusanen*, sekretario, *Veikko Tikkanen* kasisto kaj estrarvicmembro. Aliaj estrarmembroj: *Paula Harju*, *Väinö Havu*, *Jukka Nikoskelainen* kaj *Anja Launiainen*; vicmembroj *Merja Uotila* kaj *Varpu Karo*. Agadkontrolantoj: *Orvo Haavisto* kaj vice *Ilpo Forsström* kaj *Ulla Salonen* kaj honore *Jorma Ahomäki*. Jorma Ahomäki estis nomumita kiel honora membro de la societo en la 50-jara festo la 15-an de decembro 2012. EST tre fieras pro sia multjara, ankoraŭ tre aktiva membro. La societo ankoraŭfoje deziras danki pro ĉiuj gratuloj kaj salutoj por la 50-jariĝo. Printempe kaj somere daŭras la merkredaj renkontiĝoj en la kafejo Sirius de la ĉefbiblioteko. Kiel ekskursoj estas planitaj vizito al la vjetnama budhista templo de Turku kaj vizitoj al la kastelo kaj la arta muzeo. Gastoj estas ĉiam bonvenaj. Informiĝu ĉe EST-anoj pri datoj, kontaktuloj estas la sekretario de EST, Leena Tiusanen (tel. 050-5757956, leena.tiusanen@elisanet.fi) aŭ la

prezidanto, Tiina Oittinen (kontaktinformoj sur la antaŭlasta paĝo).

– Turun Esperanto-yhdistyksen hallitus järjestäytyi 19.2.2012 pidetyn vuosikokouksen jälkeen seuraavasti: Tiina Oittinen, puheenjohtaja, Anna-Liisa Ali-Simola, varapuheenjohtaja, Leena Tiusanen, sihteeri, Veikko Tikkanen rahastonhoitaja ja hallituksen varajäsen. Muut hallituksen jäsenet: Paula Harju, Väinö Havu, Jukka Nikoskelainen, Anja Launiainen, varajäsenet: Merja Uotila ja Varpu Karo. Toiminnan tarkastajat: Orvo Haavisto, Ilpo Forsström, Ulla Salonen ja kunniajäsen Jorma Ahomäki. Yhdistys kiittää vielä kerran kaikista muistamisista 50-vuotispäivän yhteydessä. Keväällä ja kesällä jatkuvat keskiviikkoiset kahvilatapaamiset pääkirjaston Sirius-kahvilassa. Retkiä suunnittelemme mm. Turun vietnamilais-buddhalaiseen temppeleihin, Turun linnaan ja taidemuseoon. Vieraat ovat aina tervetulleita; varmistautukaa päivistä joko sihteeri Leena Tiusaselta (tel. 050-5757956, leena.tiusanen@elisanet.fi) tai puheenjohtaja Tiina Oittiselta (yhteystiedot lehden jäsenjärjestöt sivulla)

Tiina Oittinen

Libroeldono en 2011

Dum 2011 en nia libromerkato aperis 172 libroj en/pri Esperanto, kun entute 19775 paĝoj, iom malpli ol averaĝe dum la lasta jardudefo. La plej aktiva Esperanto-eldonejo denove estis MAS (Monda Asembleo Socia), prizorgata de Vilhelmo Lutermano, kun 26 volum(et)oj politikaj kaj sociaj de maldekstraj aŭtoroj, kiujn plejparte li mem tradukis.

Vidu detalajn tabelojn laŭtemajn, laŭeldonejajn,

laŭlandajn, laŭlingvaj kaj klarigojn pri ili en la tradicia revuo de Aleksander Korĵenkov, kiu ekde la jaro 1991 aperigas en “La Ondo de Esperanto” statistikajn resumojn de la libroeldonado en Esperantujo. Lia superrigardo por 2011, publikigita en la februara kajero de “La Ondo de Esperanto”, aperis en la novaĵ-retejo “La Balta Ondo”: <http://sezonoj.ru/2012/02/208knig/>

[laŭ La Balta Ondo]

Literatura konkurso de Impeto

En 2012 “Impeto” havos 20 jarojn. Dum tiuj jaroj la eldonejo aperigis 129 librojn en kaj pri Esperanto. Okaze de la venonta jubileo, ni organizas konkurson de literaturaj recenzoj. Partopreni ĝin povas ajna esperantisto, kiu sendos recenzon pri ajna libro de “Impeto” al la konkursa adreso. Recenzoj povas esti jam publikigitaj, novaj, kun subskriboj de veraj nomoj aŭ de pseŭdonimoj. Ni atendas literaturajn recenzojn, t.e. ke ili unuavice malfermu sencon de la verko aŭ ĝia parto, klarigu problemojn, kiujn levis la aŭtoro, montru aktualecon (aŭ ne) de la verko, faru komparon kun aliaj aŭtoroj.

La konkurso okazos en du etapoj:

1. La venintaj recenzoj estos publikigitaj en interreto, kie eblos esprimi sian opinion pri la recenzo kaj aljuĝi poentojn povos iu ajn deziranto.
1. Dum la dua etapo restos nur tri recenzoj, kiuj ricevis pli multe da poentoj. Komenciĝos la sekva etapo de la voĉdonado (la antaŭaj poentoj estos nuligitaj). Same, voĉdoni rajtos ajnaj esperantistoj, kiuj registriĝis ĉe la retejo.

Ankaŭ al la voĉdonado aliĝos redakcioj de “REGo”, “Scienco kaj Kulturo” kaj “Impeto”, ĉiu el kiuj povos aljuĝi nur unufoje 5 poentojn al unu el tiuj tri recenzoj.

La plej bonaj recenzoj estos publikigitaj en periodaĵoj “REGo” kaj “Scienco kaj Kulturo”. La aŭtoroj de la plej interesaj recenzoj ricevos de la eldonejo pormemorajn donacojn, la gajninto – 100 eŭrojn.

Recenzoj estas akceptataj nur forme de mesaĝo aŭ/kaj dosiero alroĉita al ĝi al la retadreso: recenzo@impeto.ru ĝis la 15-a de oktobro 2012. La dua etapo komenciĝos la 30-an de novembro kaj finiĝos 10-an de decembro. Pri la rezultoj de la konkurso ni anoncos la 15-an de decembro 2012. La solena celebrado de la gajnintoj okazos decembre 2012 en Moskvo.

Voĉdonado por la recenzoj okazas kadre de paĝaro <http://trovu.com/plumo>. Tio signifas, ke aŭtoro, sendante la recenzon, aŭtomate konsentas pri ĝia publikigo ĉe la menciita paĝaro.

Atentu, ke pri la aŭtoraj rajtoj zorgas mem sendintoj de la recenzoj. Se la recenzo estis ie antaŭe publikigita, estas bezonata permeso ne nur de la aŭtoro, sed ankaŭ de la ceteraj rajtposedantoj.

[<http://impeto.trovu.com>]

Loga programo en la franca Esperanto-kastelo Greziljono



Printempa semajno kun intensivaj kursoj kaj KER-ekzamenoj: 13a ĝis 21a aprilo 2012, detaloj interrete: gresillon.org/printempo

Somera programo kun 4 laŭtemaj semajnoj: 21a julio ĝis 20a aŭgusto 2012, detaloj interrete: gresillon.org/somero

Kontaktoj: kastelo@gresillon.org, +33-241 89 10 34, gresillon.org Adreso: Gresillon, 49150 SAINT MARTIN D'ARCE, Francio

Bert Schumann

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com
- ♦ Salo Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. www.esperanto.fi/tampere (Jukka Laaksonen: jvaletto@kolumbus.fi) ☎ 050 5829 248)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 steleto@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden

hinta jäsenille on 14 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 20 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 40 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on aktiivinen esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu säännöllisesti. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). esperanto@phnet.fi.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogruppo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2012

Nro	Limdato	Aperas
3/2012	31.5.	en junio
4/2012	1.9.	en septembro
5/2012	15.11.	en decembro


Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:
eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Aperis libro pri ELFI



Sylvia Hämäläinen prezentas ELFI-libron.

Aŭtoro: Sylvia Hämäläinen

Eldonanto: ELFI

Enhavo: 110 paĝojn

Multe pli ol nur pri ELFI

Krome: finna kaj sveda resumoj

Prezo: 10 €, por membroj 5 € + afranko

Havebla: ĉe EAF kaj Sylvia Hämäläinen

tel. 050 321 4313, sylvia.h@kolumbus.fi

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy kesäkuussa. Jutut 31.5.2012 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en aprilo. Artikoloj ĝis 31.5.2012 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: [<efgazeto@esperanto.fi>](mailto:efgazeto@esperanto.fi).